

Heinrich Heine,  
The Lorelei

*tradukita de Mark Twain*

*An ancient legend of the  
Rhine*

I cannot divine what it  
meaneth,  
This haunting nameless  
pain:  
A tale of the bygone ages  
Keeps brooding through  
my brain:

The faint air cools in the  
gloaming,  
And peaceful flows the  
Rhine,  
The thirsty summits are  
drinking  
The sunset's flooding wi-  
ne;

The loveliest maiden is  
sitting  
High-throned in yon blue  
air,  
Her golden jewels are shi-  
ning,  
She combs her golden  
hair;

She combs with comb that  
is golden,  
And sings a weird refrain  
That steps in a deadly  
enchantment  
The listener's ravished  
brain:

...

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

*Tiu traduko estas poste  
iom modifita de aliu-  
loj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leo-  
pold Elb.*

Ne scias mi, kial mi  
estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia me-  
mor'.

Vespero jam ekmal-  
heliĝas,  
Fluadas la Rejn' en  
trankvil',  
La supro de l' monto  
lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen  
tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon  
kronas  
Mirinde la ora ha-  
rar'.

Ŝi uzas kombilon el  
oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim  
Gießner*

*Tiu traduko estas poste  
iom modifita de aliu-  
loj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leo-  
pold Elb.*

Malgajon mi sentas  
en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa  
foro  
Vagadas tra mia  
anim'.

Jam fluas la Rejn' en  
malhelo,  
kaj malvarmetas l'  
aer'.  
Sed brilas la mont' en  
orbelo  
pro suna lum' de l'  
vesper'.

Jen supre kabino pro-  
vokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas  
sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, miri-  
ge  
potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

*Tiu traduko estas poste  
iom modifita de aliu-  
loj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leo-  
pold Elb.*

Min kaptas malgaj'  
en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun  
persist'.

Aere fridetas, trank-  
vilas,  
malhelas jam la Re-  
jn'.  
La monto surpinte  
brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el  
or'.

Ŝi kombas per ora  
kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

The doomed in his drifting shallow, Is tranced with the sad sweet tone, He sees not the yawning breakers, He sees but the maid alone:	Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priententas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremo- ci'. Ne ĝenas lin rifokaskado, rigardas nur supren al ŝi!	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.
--	--	--	--

The pitiless billwos engulf him!- So perish sailor and bark; And this, with her baleful singing, Is the Lorelei's gruesome work.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad'.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.
---	---	---	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)